Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko EKO 2018-04 sendita el Budapeŝto, la 5an de marto.

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Jen la APERo de AMO

Unika evento okazis la 20-22-an de februaro en la apudmoskva ripozejo 'Jerŝovo' – la unua Tutrusia AMO-Seminario (Seminario pri Aktivula Maturigo) kaj la dua AMO-seminario en Rusio. Ĝi okazis sub la aŭspicio de UEA kaj en la tutmonda serio ricevis la numeron 44. Por nia grandega lando tiu ĉi AMO estis la provo okazigi seriozan primovadan laborkunvenon pri la evoluo de la Rusia Esperantujo. La temo de nia AMO estis superaktuala: 'Modernigo kaj junigo de la Rusia Esperanto-movado'.

AMO-44 arigis 15 homojn el kvar fedaraciaj regionoj: 10 el la Centra (Moskva gubernio), po du el la Nord-Okcidenta (Sankt-Peterburgo kaj Novgorodo) kaj Suda (Novoĉerkasko kaj Volgogrado), 1 el la Urala regiono (Jekaterinburgo). La aĝo de 7 partoprenintoj estas malpli ol 41 jaroj, la plej juna havas 13. Estis 8 inoj kaj 7 viroj. La aranĝon organizis la Moskva Esperanta Asocio MASI kunlabore kun Rusia Esperantista Unio – la Landa Asocio de UEA. Partoprenis 9 REU-membroj (el kiuj 4 REU-estraranoj) kaj 8 membroj de MEA MASI.

En la 20-an de februaro, post la Malfermo, kie estis elektita la protokolanto de AMO-44 (*Kirill Noviĉenko*), komenciĝis la programo: la seminario de Irina Gonĉarova 'Kio estas tiu ĉi AMO por ni'. Ni spektis lumbildprezentadon de la REU-prezidanto Svetlana Smetanina pri la aktuala stato de la rusia E-movado. Sekvatage okazis la kvarhora trejnado 'Kio estas rusia esperantistaro kaj kia estu ĝia estonto' gvidata de *Irina Gonĉarova* per FLAM-analizo de la nuna situacio kaj EKEK-solvoserĉado 'Kiel plibonigi la situacion en Rusio'. Ĝin sekvis trihora trejnado 'Kiel organizi E-agadon' de *Alisa Zingerman*, laŭ la metodo SPRINT. Vespere *Irina* okazigis Rondan Tablon 'Informado kaj varbado. Kiel allogi gejunulojn al Eo?'. Malfruvespere aldoniĝis multaj ŝercoj kaj anekdotoj el la Esperanta vivo.

La 22-an de februaro ni daŭrigis la trejnadon pri varbado, kies temo agitis la partoprenantojn. Post pridiskuto de la protokolo kaj akcepto de komunaj konkludoj venis konkretaj projektoj. La REU-vicprezidanto *Nikolao Gudskov* raportis kun lumbildoj pri la REU-projekto 'Lasta adreso' pri pendigado de memorŝildoj sur la domojn, el kiuj sovetiaj esperantistoj estis veturigitaj al prizonoj kaj pereo en la morna tempo de la stalinaj reprezalioj. Post tiuj streĉcerbaj temoj ni volonte partoprenis la gajan lingvan metiejon de *Svetlana* pri absurda frazfarado, kiu multe helpus lingvinstrue kaj etose dum ajna esperantista kunveno.

Intertempe komencis alvenadi la partoprenontoj de APERo-12. Poste okazis prezentado de Esperantaj projektoj en la hodiaŭa Rusio: *Rafija Kudrjavceva* rakontis pri la tradiciaj ĉeestaj renkontiĝoj en Jekaterinburgo kaj Uralo kaj pri la interretaj projektoj de tiu ĉi plej bone organizita Esperanta regiono en Rusio. Irina Gonĉarova prezentis kvar la plej 'junaj' projektoj de MEA MASI ('Esperanto: la unua kanalo', 'Esperanta PoŝtKruciĝo', 'MiA MASI' kaj 'Internacia vidbenda babilejo kun moskvaj esperantistoj). La ideo estis, ke eĉ unu persono kapablas krei grandan internacian projekton. Kiel 'Hejm-taskon' al la homoj estis taskitaj verki sian propran projekton laŭ la donita skemo. Sekvis negranda vidbenda enkonduko kaj interaktiva pridiskuto laŭ la temo 'Ideologioj de esperantismo. Kio vi estas?', organizita de Nikolao Gudskov.







Ĉe la fermo de AMO, ĉiu emis pli profunde analizi la seminariajn materialojn daŭrigi la aktivadojn en niaj loĝlokoj. Enkadre de APERo-12, jam kun partopreno de kromaj dekoj da diversaĝaj homoj, ni daŭrigis dum la trejnado 'Ligoj inter E-generacioj', okazigita de Raifa, poste la diskutrondo 'Kiu estas bona esperantisto kaj kion ni povas fari por Esperanto kaj la Movado' estis prezentita de Ilja Gnusarjov. Nia esperoestas realigi la primovadajn seminariojn en Rusio regule kaj fruktodone.

*Laŭ raporto de Irina Gonĉarova, kunordiganto de MEA MASI, estrarano de REU pri Regiona Agado, 26.02.2018*

## UMEA portas nin refoje al la reala mondo

La Monda Medicina Asocio ĵus (*World Medical Association*) publikigas la Esperanto-tradukon de la „Deklaracio de Ĝenevo" en sia retpaĝaro:

https://www.wma.net/what-we-do/medical-ethics/declaration-of-geneva

(poste serĉu dekstre sub „WMA Policy Resources") klaku la vorton 'Esperanto'.

Pri tiu paŝo WMA, kiu reprezentas 109 naciajn medicinajn asociojn kaj 10 milionojn da kuracistoj, informis la 9017 abonantojn de siaj Tvitero-mesaĝoj per aparta 'Pepaĵo'. La Esperanto-traduko estas post la traduko germanen nur la dua jam preta traduko en unu el la neoficialaj lingvoj de la asocio. La prezidanto de UMEA:
"Miaopinie estas bela sukceso, ke tiom grava, altestimata kaj serioza asocio kiel WMA tiel implicite agnoskas Esperanton kiel tute akceptebla, samranga lingvo inter multaj aliaj."

La komenco de la Esperanta teksto:


Monda Medicina Asocio

Deklaracio de Ĝenevo

Akceptita de la
2-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Ĝenevo, Svislando, Septembro 1948
kaj reviziita de la
22-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Sidnejo, Aŭstralio, Aŭgusto 1968
kaj reviziita de la
35-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Venecio, Italio, Oktobro 1983
kaj reviziita de la
46-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Stokholmo, Svedio, Septembro 1994
kaj lingve prilaborita okaze de la
170-a Estrarkunveno, Divono-la-banoj, Francio, Majo 2005, kaj de la 173-a Estrarkunveno, Divono-la-banoj, Francio, Majo 2006
kaj reviziita de la
68-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Ĉikago, Usono, Oktobro 2017

**Promeso de la kuracisto**

Kiel membro de la medicina profesio

mi solene promesas dediĉi mian vivon al la servo de la homaro.

## Evoluoj ĉe <aktivulo.net>

**EKO-komunikoj:** ĉiuj el 2017 estas legeblaj en <aktivulo.net> ĉe la rubriko 'Agadaj raportoj' kaj devas aperi tuj je malfermo de la paĝaro. Ili aperas en tri kategorioj: Ĝis la UK, Dum la UK (kaj la Kongreso de ILEI), Post la UK.

**Gvidiloj:** tiu parto estas bele ampleskigata. UEA havas svarmon da regularoj sed nesufiĉaj gvidiloj. Regularoj bremsas, gvidiloj stimulas. La unua gvidilo restas neverkita ĉar ĝia celo estas resumi la Asocian celaron kaj doni praktikan eniron al la aliaj gvidiloj. Trovu la gvidilojn ĉe 'Pliaj projektoj > Gvidiloj'.

| | |
|---|---|
| GO 2 | Gvidiloj por Komitatanoj |
| GO 3 | Gvidilo por Estraranoj (precipe novaj) |
| GO 4 | Gvidilo por Landaj Asocioj |
| GO 5 | Gvidilo por Kotizperantoj (en preparo) |
| GO 6 | Gvidilo por Ĉefdelegito |
| GO 7 | Gvidilo por Komisiitoj |

Ekzistas plie agada gvidilo

| | |
|---|---|
| GA 1 | Gvidilo por kursgvidantoj (donacita de ILEI jam en 2012) |

Ĉe <aktivulo.net> la sekva celo estas aperigi la paĝaron pri AMO tra 2017.




Vortoj = 855

====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.